# 10-jariĝo de la Esperanto-Muzeo en Svitavy

Libuše Hýblová,
prezidantino de ĈEA



14–16 septembro 2018 ĉeĥaj esperantistoj festis la 10-jariĝon de la Esperanto-Muzeo en la urbo Svitavy. Ni preparis ne nur novan ekspozicion, sed ankaŭ solenan feston kun tritaga akompana programo, kiu okazis sub aŭspicio de la urbestro de Svitavy, sinjoro David Šimek, kaj kiun partoprenis ankaŭ eksterlandaj gastoj.

Vendrede estis solene malfermita ekspozicio nomita “10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko”. La unua parto de la ekspozicio prezentas eksterlandajn gastojn de la muzeo, pasintajn aranĝojn, eksponaĵojn de donacintoj kaj ankaŭ bildojn de la urbo Svitavy kaj de la Regiono Pardubice pere de Esperanto. La dua parto estas dediĉita al la historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio en la jaroj 1918–1968. Sabate okazis ne nur solenaĵo, kiu interalie prezentis al ni dek jarojn en la Muzeo, sed ankaŭ ekskurso kaj vespere publika koncerto de muzikgrupo, kiu kantas ankaŭ Esperante. La dimanĉo estis destinita al Muzea seminario.




Foto de Pavla Dvořáková



Ni memorigu, ke la muzeo estis solene inaŭgurita la 20-an de septembro 2008 kaj estiĝis danke al kunlaboro inter la urbo Svitavy, la Urba Muzeo kaj la Galerio Svitavy, la loka Esperanto-klubo kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La ekeston de la muzeo grave finance subtenis la Ministerio pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko, la urbo Svitavy, la fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj ĈEA. La domo, en kiu la Muzeo situas, estas posedaĵo de la urbo kaj la Esperanto-Muzeo estas tie en senpaga luo.

Nia danko apartenas al ĉiuj, kiuj iamaniere subtenas la Muzeon kaj al tiuj, kiuj senlace prizorgas ĝin. Sed la Muzeo bezonas ankaŭ vizitantojn, do bonvenon! Ni elkore akceptos vin dum la tuta jaro.

# Kalejdoskope

## Esperanto-kursoj en Vieno

Walter Klag

Ekde januaro 2014 okazas unu aŭ du fojojn en la monato unuhoraj Esperanto-kursoj en Vieno, Aŭstrio, por ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la internacian lingvon. La loko de la renkontoj estas la kafejo Schopenhauer en la 18-a distrikto de Vieno, kiu proksimas al multaj universitatoj. La varbado por tiuj kursoj okazas per afiŝoj, kiuj pendas en la enirejoj de la universitatoj. Tial la partoprenantoj estas preskaŭ nur junaj homoj 15-ĝis-35-jaraj. Multaj gestudentoj ne estas aŭstroj, sed ili regas la germanan lingvon. Ĝis nun okazis 58 kursoj kaj venis pli ol 200 gestudentoj. Unufoje en la jaro okazas premia konkurso por tiuj partoprenantoj. La premioj estas Esperanto-moneroj, ekzemple la arĝenta 100-Stela monero (2018) kaj aliaj.

Por daŭrigi la lernadon okazas dufoje en la monato regulaj renkontiĝoj en picejo en la 15-a distrikto de Vieno.




Sur la foto: afiŝo pri Esperanto-kurso en la jura universitato de Vieno, la 3-an de oktobro 2018

## Promenu virtuale tra la Esperanto-Muzeo

Ekde nun vi povas viziti la Internacian Esperanto-Muzeon, kiu troviĝas en Zaozhuang, Ĉinio, ne nur ĉeeste, sed ankaŭ virtuale, ĝuante profesie preparitan tridimensian panoramon. Ĝuu la promenon en via krozilo en la retejo: *http://zzait.com/quanjing/sjybwg*

